

La tiama prezidanto de UEA, prof. G. Canuto metas florkronon sur la tombon de Zamenhof okaze de la 44a UK en 1959.

Junulo, kiu revoluciis per lingvo

La 15an de decembro 1859 en la malnova pola urbo Bjalistoko, ĉe Marko Zamenhof, instruisto de modernaj lingvoj, naskiĝis filo, nomita Ludoviko Lazaro. En Bjalistoko la loĝantaro konsistis el kvar nacioj: poloj, rusoj, germanoj kaj hebreoj. Homoj, apartenantaj al diversaj nacioj, parolis ĉiuj sian propran lingvon kaj malinkline rilatis unuj al la aliaj. Sur ĉiu loko la juna Ludoviko, knabo tre impresiĝema, povis konstati, kiel diverslingveco dividas kaj disigas la popolojn. Post jaroj, en sia fama letero al la rusa esperantisto Borovko pri la deveno de Esperanto li skribis jenon:

"Oni edukadis min kiel idealiston, oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj, k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon."

Ludoviko Zamenhof iom post iom forĵetis siajn infanajn revojn. Restis nur la revo pri tuthomara lingvo, kiu revo akompanis lin dum la tuta vivo.

Estante lernanto de klasika gimnazio en Varsovio, Zamenhof eklonis antikvajn lingvojn. La juna gimnaziano revis, ke li veturos tra la mondo kaj per ardaĵaj paroladoj instigos homojn lerni unu el la antikvaj lingvoj por ties komuna uzado. Baldaŭ Zamenhof forlasis ankaŭ tiun ĉi infanan revon.

Li komencis fari provojn krei lingvon, li elpensadis plej komplikajn deklinaciojn kaj konjugaciojn. Al la juna Ludoviko ŝajnis, ke estas preskaŭ neeble krei artan lingvon. Timigis lin dikaj vortaregoj. Tamen li ne deziris rezigni pri sia ideo.

Ankoraŭ en la infanaĝo Zamenhof lernis la germanan kaj francan lingvojn. Estante lernanto en la kvina klaso de gimnazio li komencis studi la anglan. La simpleco de la gramatiko mirigis lin kaj Zamenhof ekkomprenis, ke riĉeco de gramatikaj formoj ne estas necesa por la lingvo. Tamen restis la problemo de dikaj kaj grandaj vortaroj.

Jam en la sepa klaso de gimnazio li rimarkis la saman finaĵon de la rusaj vortoj: "*ŝvajcarskaja*" (pordistejo) kaj "*konditjerskaja*" (sukeraĵejo). Li ekkomprenis tiam, ke oni povas krei novajn esprimojn per sufiksoj kaj prefiksoj.

Ankaŭ tiam Zamenhof ekkomprenis, ke oni ne devas arbitre ŝanĝi tiel nomitajn internaciajn esprimojn, kiuj ja troviĝas en ĉiu lingvo kaj povas formi grandan provizon da vortoj en la pripensata de li nova lingvo.

En la jaro 1878 la nova lingvo estis pli malpli preta, kvankam de la tiam "*Lingwe Uniwersala*" ĝis la nuna Esperanto estis ankoraŭ grandega distanco.

En la jaro 1887 fine povis aperi en Varsovio modesta libreto, enhavanta 16 regulojn gramatikajn de la nova lingvo, prefiksojn kaj sufiksojn kaj la unuan vortareton kun 927 vortradikoj. En la libreto troviĝis ankaŭ kelkaj tradukitaj tekstoj, inter aliaj fragmento de la Biblio, la preĝo "*Patro nia*" kaj originalaj versaĵoj, verkitaĵoj en la nova lingvo: "*Ho, mia kor*" kaj "*Mia penso*". Tiuj ĉi versaĵoj priskribis la sopiron kaj suferojn de la juna idealisto.

La libreto estis titolita "*Doktoro Esperanto. Lingvo internacia*". Ĝi aperis en la rusa kaj tuj poste en la pola lingvoj. Esperanto signifas homon, kiu esperas. La kreinto de la lingvo ekde la frua infanaĝo esperis, ke malaperos la limoj, dividantaj la popolojn, se ili ĉiuj povos interkompreniĝi. Nun li dividis sian esperon kun ĉiuj homoj de bona volo, kiuj – apud sia nacia lingvo – sentos la bezonon de komuna lingvo. Al tiuj homoj, al iliaj zorgoj kaj klopodoj li dediĉis la belan frukton de siaj laboradoj, la internacian lingvon. Zamenhof

saĝe substrekis, ke la *"sorto de la vivanta lingvo ne povas dependi de la sorto de tiu aŭ alia persono"*. La nova lingvo fariĝis vivanta kaj ĝia sorto jam ne dependis de la genia homo, kiu kreis ĝin, sed de la ĉiam pli grandiĝanta aro da homoj uzantaj tiun ĉi lingvon praktike. Ricevinte la plej altajn honorigojn, Zamenhof ne ĉesis esti modesta doktoro pri medicino, kuracanta malsanajn okulojn. Ja honore al li oni ludis la marseljezon sur Eĵfel-turo en Parizo kaj oni ekbruligis ĉiujn lumojn en la salminejo en Wieliczka. En Antverpeno studentoj entuziasme eljurgis la ĉevalojn el la veturilo, en kiu veturis Zamenhof, kaj mem tiris la veturilon. En Kembrigo honora taĉmento de la reĝa kavalerio eskortis la veturilon, en kiu veturis la kreinto de Esperanto, al la universitato, kie profesoroj, gvidataj de la rektoro, en solenaj toĝoj, iris renkonte al Zamenhof kaj salutis lin kun respekto. Ludoviko Zamenhof ricevis la ordenon de la Franca Legio, la hispanan ordenon de Izabela la Katolika kaj multajn aliajn distingojn. Lian nomon havas stratoj en centoj da urboj en multaj landoj. Li estis la unua homo en la mondo, al kiu oni starigis monumenton ankoraŭ dum la vivo (en Franzensbad - detruita de hitleranoj), en la ĉefurbo de Aŭstrio - Vieno, sur unu el la placoj, oni konstruis al li monumenton, Zamenhofa monumento troviĝas en la malproksima Brazilo, en Belo Horizonte. Poŝtmarkojn kun la portreto de Zamenhof kaj honore al li emisiis multaj landoj.

Zamenhof ek troviĝis ankaŭ sur maroj kaj en la aero. Pola ŝipkompanio baptis unu el siaj marunuoj *"Zamenhof"* kaj la nomon de la kreinto de Esperanto ricevis unu el la aviadiloj de la pola flugkompanio LOT.

La persono de Zamenhof kaj lia verko fariĝis ankaŭ inspiro por polaj artkreatoj. Eklz. profesoro Henryk Jabłoński dediĉis al ĝi la simfonian muzikverkon *La stelo de l' espero*, kaj Andrzej Koszewski, mondfama komponisto de koruskantoj, komponis la kanton *La espero* laŭ la vortoj de Zamenhof, kiun kanton - kadre de la 9a Festivalo de la Nuntempa Muziko "Varsovia aŭtuno" - plenumis la Koruso de la Nacia Filharmonio en Varsovio.

Doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo, mortis la 14an de aprilo en la jaro 1917. Sur lia tombo en la hebrea tombejo en Varsovio staras modesta, kia estis lia vivo, monumento, *"starigita de la tutmonda esperantistaro"*. La partoprenantoj de la ĉi-jara Jubilea Universala Kongreso de Esperanto ne forgesu viziti la varsoviajn hebreajn tombejojn kaj meti florbuke- don ĉe la tombo de la kreinto de la internacia lingvo.



ELOISA ZORZETTO

Que Rei Sou Eu?

JAM de kelka tempo la televido opciis pri malfermo de spaco en sia programo por politikaj alegorioj, tio estas, rakonti la realecon pere de fikciaj historioj. Pere de la teleromano (portugallingve "tele-novela") "QUE REI SOU EU?" (Kia Reĝo Estas Mi?), far Cassiano Gabus Mendes, je la 7a horo ptm, TV-Reto Globo ampleksigas tiun spacon. Disponante de ravaj scenejoj kaj epok-vestaĵoj, la historio de la regno de Avilan temas pri iu transloko de la hodiaŭa Brazilo kun kelkaj etaj diferencoj.

"Que Rei Sou Eu?" disvolviĝas inter 1786 kaj 1789 en ia punkto de Eŭropo. La regno nomigas Avilan (evidenta aludo al la romano "As Brumas de Avalon", far Marion Zimmer Bledy). La fono de la historio estas la korupteco, la nepagbla eksterna ŝuldo, la nekontrolebla inflacio kaj la ekonomia PLUAS

miaj "ŝokoj". Ŝokoj kiuj rajtas frostigon de prezoj kaj ŝa
 ŝa ŝa en la mono. Ĉu ĉia simileco estas simpla koincido?
 (el la monata gazeto "Multiarte"; tradukis c.d.s)



Korespondajoj

EL BRAZILJO/ DF:

"ABC-3 atingis nin. Dankon. Ĝi estas tre interesa kaj efika! Ni jam ricevis reŭabonpeton kiu mencias ĝin kiel informfonton!" (Néia Lúcia Souza, prezidantino de BEL)

EL NOVO HAMBURGO/ RS:

"Ĝia nova formato tre plaĉas al mi." (Alice Amália Klein)

EL VOLTA REDONDA/ RJ:

"Mi varme gratulas vin kaj la aliajn kunlaborantojn. Antaŭ en!" (Alberto Flores)

EL VOLTA REDONDA/ RJ:

"Esperantistaj radio-amatoroj" aperu" ĉe "Verda Rondo" saba te kaj dimanĉe je la 20.30 h UTC en la frekvenco de 14266 KHz kaj havos la oportunun paroli en Esperanto kun diversaj landoj kiel ekzemple FR kaj DR Germanio, Francio, Hungario, Jugoslavio, Kanarioj, Usono, Nederlando, Ĉilio, Argentino kaj aliaj." (Herickson Barreira)

5a SADBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO
 5a SADBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO
 5a SADBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

7-9/10/89 SANTA MARIA, RS



**Okcidenta
sekseco**

RAVECO, seriozeco kaj plezuro estos la sensacioj de la leganto kiu atente tralegos la ĉefverkon de Jean-Luis Flandrin, portugallingve "O Sexo e o Ocidente" ("La Amoro kaj Okcidento"), feliĉe nun publikigita inter ni. La libro pritraktas pri la ŝanĝoj kaj modifoj de tiu, kiun ni komprenas kiel seksecon; tiu ĉi hodiaŭe ni tute scias, kontraŭe al la ŝarkoj, neniam restis la sama tra la tempoj. La fundamento de la libro temas pri diskutado tra diversaj ĉapitroj pri la dueco tiel valora al la kristana Okcidento: la amo ene kaj ekstere de la geedziĝo. La 16a, 17a kaj 18a jarcento estus travivintaj la plifirmigon de iu geedza modelo en kiu nenio estus permesata escepte la koito, malprofite de alia, antaŭgeedza, en kiu ĉiu estis permesata escepte la koito. La dua modelo ebligis la disvolviĝon de iu neŝtilda sekseco, farita de karesoj kaj dorlotoj kiuj evitis la penetradon kaj prokrastis la orgasmon. Flandrin studas tiujn modelojn pere de librotoloj de la periodo montrante kia ĵusa estas la ideo pri geedza amo; antaŭe oni produktis polemikan verkaron pri la geedziĝo kontraŭstarante kaj ridindigante ĝin. La libereco pri elekto de la

PLUAS

geedza paro antaŭsupozus la seksan intimecon inter ili, aŭ
 ĉar tiam ege kontraŭbatalita de la Eklezio en ĝia provo
 servemigi la fianĉecon. Flandrin ankoraŭ montras kia mal-
 akceptinda en la regantaj klasoj estis la geedziĝo pro a
 mo pro la sociaj malordigoj, kiujn tia frenezuma gesto
 povus kaŭzi. Ĝis la 19a jarcento oni valorigis la geedzi-
 gon por "konveneco aŭ kialo", ene de kiu sintrudis la
 kristana problemeco de la geedzaj interrilatoj: la plezu
 ro devus esti evitinda ĉar ĝi estis rilatigita al morta-
 la peko kaj la ama allogeco estis konsiderata neracian.
 La celo de la geedza vivo estis ekskluzive la reproduk-
 tado. Analizante la kutimojn pri la soleca plezuro, sodomio
 kaj sekskuniĝo kun bestoj, nia aŭtoro rimarkigas la
 perfortan retenadon kiu falis sur la seksan vivon de la
 junuloj ekde la 16a jarcento. Fine, legi "O Sexo e o Ocide-
 nte" estas realigi ian specon de senvestiĝo de la sek-
 seco en la Historio cele vidi iom plie trans la solecon
 en kiu ĉiu el ni restas en sia izolita sekseco. (LUCIANO
 TRIGO, en la revuo LEIA; tradukis c.d.●)



Esperanto-Societo de P. Alegre

Propra sidejo: Andradas, 1137/1704 BR-90020 Porto Alegre
 RS, Brazilo. Poŝt-kesto 1415. Fondita je 2/4/1945. Rekonata
 kiel havanta publikan utilecon laŭ municipa leĝo n-ro
 483 de 13/11/1950. Estrarperiodo 89/91: prezidanto: Erna-
 ni Borges, vic-prezidantino: Zelia da Silva Zaghetto, 1-a
 sekretariino: Cleonice de Lima, 2-a sekretario: Solon
 Sant'Anna, kasisto: Wenceslau Gonçalves, bibliotekisto:
 Cesar Dorneles Soares. Nacia cirkulado. Oni petas interesan
 ĝon. Ĉiu kunlaboraĵon estas bonvena!


en Caçapava do Sul
KREITA E-STUDGRUPO

"Grupo de Estudo de Esperanto Francisco Valdomiro Lorenz" estis kreita en Caçapava do Sul (RS). Ĝi adresas ĉe str. Lucio Jaime, 482 - 96570 Caçapava do Sul, RS. Oni sugestas sendon de materialo al la grupo.

en Campo Grande/MS
25a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Nia nacia kongreso ĉijare okazos en Campo Grande/MS de la 10a ĝis la 14a de julio, kies temo estos "Esperanto kaj Ekologio : kiel marŝi duope?". Prelegoj, debatoj, kunvenoj, kursoj, elekto de nova BEL-estraro, ebleco ekzameniĝi kaj ricevi ateston de BEL, ekskurso al pantanala rezervejo kaj diversaj ĝuindaj eroj konstituos la eventon. Tuj post la fermo de la kongreso, oni povos vojaĝi grupe al Argentino por ĉe esti la 49an Argentinan Kongreson de Esperanto, en Saenz Peña, de la 20a ĝis la 23a de julio.

INTERNACIA REVUO PRI PEDAGOGIO



ESTU MEMBRO DE "E S P A" *****

Jam estis difinitaj la kotizoj por fariĝi ano de ESPA: junuloj ĝis 21-jaraĝaj: Cz\$ 1,00 monate; efektivaj membroj : Cz\$ 1,50. ESPA-anoj havas je sia dispono nian bibliotekon, ricevon de ABC kaj aliajn avantaĝojn. Krome, oni ne forgesu, ke nur pere de via financa apogo ni povas subteni kaj plibonigi ESPA-aktivadon.

NI SEMAS

en Kubo

KIO PRI LA "INTERNACIA KONFERENCO POR LA EVOLUC DE ESPERANTO EN IBEROAMERIKO"? NÉIA LÚCIA SOUZA, PREZIDANTINO DE "BEL", ĜIN PARTOPRENIS KAJ ĈI SUBE RAPORTAS PRI ĜI:

Ĝi estis praktika ekpaŝo al komuna laboro por Esperanto en Iberoameriko. Vere temas pri Iberoameriko ĉar la celo estas kunligi ĉiujn landojn el Ameriko inkluzive Usono kaj Kanado. Bedaŭrinde ne multaj landoj el Ameriko sendis al Kubo siajn reprezentantojn kaj tio respegulas unu el niaj plej gravaj problemoj: manko de monrimedo en nia movado - la movado estas malriĉa kaj la movadanoj estas malriĉaj. Ĉeestis reprezentantoj el Meksikio, Kolombio kaj Brazilo; en nia kazo, Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Esperantista Junulara Organizo estis reprezentataj de siaj prezidantoj. Paralele al la Konferenco tiuj reprezentantoj, kun la estraro de Kuba Esperanto-Asocio kaj la ĉeesto de S-ino Ŭrsula Gratapaglia (kiu estis tie kiel observanto el unu el la Direktoroj de Universala Esperanto-Asocio) kunvenis plurfoje por diskuti pri la movadaj malfacilaĵoj, landaj atingoj kaj serĉi komunajn vojojn por laboro. Kiel praktika agado, Brazila Esperanto-Ligo kaj Kuba Esperanto-Asocio jam kunlaboras, interŝanĝante librojn kaj aliajn varojn dum ni esploras la eblecon eldoni tie (kie la paperkosto estas pli malalta ol en Brazilo) la Per Koresponda Kurso de BEL. KEA intencas sendi al nia 25a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, en julio, reprezentanton kaj ni invitos la aliajn landojn el Ameriko, klopodante okazigi duan kunvenon inter ni cele al stariĝo de komunaj ĝeneralaj laborvojoj - kaj en 1990, Kubo invitas ĉiujn al la 75a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO!

en Porto Alegre

"GEA" HAVAS NOVAN ESTRARON

Je la 25/3/89 estis elektita la nova estraro de GEA-Gaŭ-
 ĉa Esperanto-Asocio, por la jarduo 89/91: Prezidanto: Cé-
 sar Dorneles Soares, Vic-prezidantino: Delci Cipriani, Se-
 kretariino: Cleonice de Lima, Kasisto: Ernani Borges, DĪ
 rektoro pri Kulturo kaj Komunikado: Paulo Stekel Nasci-
 mento, Konsilantaro: Anacleto de Oliveira Amaral, Roque
 Augusto Cavalcante kaj Carmen Marli Leite da Silva. La
 prioritatoj de la nova estraro estos la kreado de fir-
 ma bazo por diskonigado de E-o kaj ĉiujara aranĝo de re-
 giona renkontiĝo.

en Santa Maria

OKTOBRON: 5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

Aranĝata de GEA kaj kun la apogo de ESSMA kaj UFSM-Uni-
 versidade Federal de Santa Maria estos realigita en San-
 ta Maria/RS, de la 7a ĝis la 9a de la venonta oktobro la
 5a SUDBRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTO, kies ejo estos "Co-
 légio Marista" ("Cerrito"). La Loka Komitato estas tiele
 konsistigita: Prezidantino: Delci Cipriani, Sekretario:
 Anacleto de Oliveira Amaral kaj Kasisto: Ivan Eidt Co-
 lling. Pliaj informoj ĉe str. Valentin Fernandes, 62, San-
 ta Maria/RS - 97050; telefonon-ro (055) 222.4001.

en Porto Alegre

ERNANI BORGES ESTAS LA NOVA PREZIDANTO DE "ESPA"

Je la 27/5/89 estis elektita na nova estraro de ESPA-Es-
 peranto-Societo de Porto Alegre, por la jarduo 89/91: Pre-
 zidanto: Ernani Borges (nuntempa vic-prezidanto de BEJO),
 Vic-Prezidantino: Zelia da Silva Zaguetto, 1-a Sekretari-
 ino: Cleonice de Lima, 2-a Sekretario: Solon Sant"Anna,
 Kasisto: Wenceslau Gonçalves, Bibliotekisto: César Dorne-
 les. Unu el la ĉefaj celoj de la nova estraro estos la
 kreado de 3-nivela kurssistemo kun difinita programo.

en Porto Alegre

"DESSEAK" HAVAS ESPERANTAN KORUSON

DESSEAK-Departamento de Esperanto da Soc. Espirita "Allan
 Kardec" - organizis koruson sub la gvidado de tri el si-
 aj kunlaborantinoj: Edy, Maria Celita kaj Beatriz. La ko-
 ruso nomiĝas "Suda Stelo" kaj en ĝi partoprenas ĉ.25 ho-
 moj.

HUMORE

FAR MILLÔR FERNANDES:

Fakuloj (1) Maranhã-a literaturo eltrovis li bron de la verkisto Souzândrade, malaperigita antaŭ okdek jaroj. Nun ili provas sukcesi mala perigi dum okdek jaroj libron de Sarney.

SPRITAĴOJ:

En la zoologia ĝardeno

antaŭ la azenoj.

Knabo: Paĉjo, ĉu ankaŭ azenoj geedziĝas?

Patro: Nur azenoj, ... mia filo.

oOo

- Fakte, doktoro, post ĉio vi fine plenumis vian promeson; vi diris, ke vi igos min piediri post unu monato.

- Nu, ĉu ne bone?

- Jes, tio efektiviĝis: mi devis forvendi mian aŭtomobilon kiam mi ricevis vian fakturon.

oOo

Serĝento: Ĉu vi razis vin hodiaŭ matene, Bob?

Soldato: Jes, serĝento.

Serĝento: Bone, venontfoje staru iom pli proksime al la razilo!

oOo

Patro (legante la lernejan atestilon): Ĉu vi ne hontas esti la plej lasta en klaso de tridek k paboj?

Filo: Povus esti pli malbone...

Patro: Kiel tio estus eble?

Filo: Supozu, ke estus kvardek knaboj en klaso...



LUIS FERNANDO VERISSIMO